

Boulogne sur Mer  
31, Boulevard Mariette  
la 19<sup>an</sup> de Dec. 1925

Kara Doktoro,

Kelkajn vortojn mi sendas al vi por danki por via letero de la 8<sup>a</sup>. Vi respondis post 4 tagoj. Vi estas pli diligenta ol ĉiuj miaj korespondantoj. Ankaŭ mi dankas pri tiu rapideco + gratulas vin.

Mi al vi + al via familio sendas miajn plej korajn gratulojn por Kristnasko + Nov'Jaro. Estu ĉiuj sanaj, feliĉaj + vi fervora Esperantisto.

Ĉio kion vi skribas estas tre interesa kiel ĉiam. Mi jam aŭdis pri Raŝin + lia kruela morto!

Jen en 2 fojoj nia franko supreniĝis de 10 frankoj al la funto, esperu ke tio daŭros!

Ĉar al vi plaĉas la odoro "Azurea" mi al vi sendas Kristnaskan + Novjaran "karton" faritan el ŝtofo. Kun ĝi vi trovos multajn bondezirojn miksitajn kun la "pudro" de azurea.

Mi komprenas tre bone + bedaŭros se vi ne povos iri al Edinburgo. Sendube tiu Kongreso konsistos precipe el Angloj + Skotoj.

Dankon por viaj bondeziroj + por viaj leteroj en 1925. Ke 1926 alportu al mi tiom kiom 1925. Lucien sendas kun mi siajn bon'dezirojn + amikajn sentojn al vi ambaŭ.

Ĉiam la sama

Alice Sergeant